

MARĜENE AL SET

Kortuŝa estis la dekminuto dum la unua etapo de la Jubilea Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, en kiu la prezidanto de ĈEA skizis la dudekjaran ekziston de la Tendaro, rememoris ĝiajn pionirojn, ĉefe la daŭre funkciantan administranton Pavel Sittauer kaj longjaran protektanton de la Junularo profesoron Theodor Kilian.

Kun ili centoj da anonimuloj senlace luktadis kontraŭ tre ofta malkompreno kaj ceteraj graŝaj obstakloj ĝis ekestis la Tendaro, kiu, ne havante komparon en Esperantujo, donas jam delonge al nia juna generacio (sed ne nur al ĝi) bonegan refreŝigon kaj spiritplenan sprite unikan eblecon pliprofundigi siajn entutajn sciojn pri la Internacia lingvo. Ĉar ĝia medio plene respondas al junaj homoj kaj ili trovas tie ĉion por sia kontento. Tial la movado en Ĉeĥoslovakio ne stagnas kaj havas vere fortan junularon, kiu transprenas devojn de la pli aĝaj celkonscie, nature kaj kun disciplino... Certe ĝoja konstato, kiam el pluraj landoj venas kontraŭaj onidiroj pri stagno en la movado, pri malintereso de junaj homoj ktp. Ĉu en tiuj landoj la forkolino de junulara atento ne estas rezulto de maljunecaj metodoj en la movada gvidado?

Nur modestaj estis la diplomoj kaj la donacoj, kiujn la prezidanto en la nomo de ĈEA transdonis antaŭ ĉiuj tendaranoj (el 7 ŝtatoj) al prof. T. Kilian, P. Sittauer kaj al Esperantista Klubo en Třebíč, sed ĉiu sentis la gravecon de la solenaj momentoj!



Dudek jaroj de SET estas malantaŭ ni; ili estis gloraj jaroj de nia ne ĉiam brilekzistanta movado.

Ek en la novajn jarojn por la bono de la homaro, por la paco en la mondo kaj ne laste vice por nia kara patrujo! (jelĝ)

ESPERANTISTÉ A NÁRODNÍ FRONTA

Základní esperantské organizace - kroužky, kluby a skupiny ČES - ve své většině správně pochopily, že další úspěšný rozvoj esperantského hnutí a popularizace jeho cílů jsou závislé na úzké spolupráci a pomoci ostatních společenských a zájmových organizací Národní fronty. Vždyť právě zde mohou uplatnit, rozvinout a šířit své mírové, protiválečné a internacionální ideje - propagovat mezinárodní jazyk esperanto a současně účinně přispívat ke společnému úsilí při budování socialistické společnosti v naší zemi.

V uplynulém období dosáhly esperantské organizace velmi dobrých výsledků, zejména pokud jde o činnost zaměřenou na pořádání některých veřejných akcí, a to buď samostatně nebo ve spolupráci s dalšími orgány a organizacemi NF, kulturními institucemi, okresními mírovými radami apod., jejichž zájmová i veřejně prospěšná činnost je v mnohém směru totožná s cíli našeho hnutí. Zvláštní místo v této spolupráci zaujímá kampaň "Čs. esperantisté bojujícímu Vietnamu", která získala zasloužené uznání a dobré jméno celému esperantskému hnutí u nás.

Některé organizace by jistě rády zaměřily svou činnost tímto směrem, ale nemají dostatek potřebných zkušeností anebo nevědí, jak začít a jakých forem a prostředků využívat. V minulém čísle jsme slíbili uveřejnit zvláště pozoruhodný příklad práce esperantské organizace. Jde o poměrně mladý esperantský klub v Boru u Tachova, jehož výbor správně chápe a realizuje zásady novodobé organizátorské a popularizační práce zájmových a společenských organizací. Spolupracuje s dalšími organizacemi NF v místě prostřednictvím výboru NF, čímž získává nejen ochotu ke spoluúčasti těchto organizací na některých svých akcích, ale i jejich výraznou pomoc. Naše čtenáře budou jistě zajímat konkrétní formy této činnosti, jež se mohou stát návodem i pro jejich vlastní práci v kroužcích. Byly to mj. tyto akce :

Veřejné besedy a přednášky v cyklu "Poznáváme svět!"

Autobusové zájezdy do zahraničí s členy jiných organizací / účastnili se i mnozí místní vedoucí funkcionáři NF, NV, KSC/.

Uspořádání dvou esp. karnevalů, z jejichž výnosu /Kčs 3000/ byl zakoupen vlastní domek /stánek esperantistů/.

Aktivní účast na výstavě "Děti, mír a umění" - spolu s Okresní mírovou radou /celostátní akce/.

Účast samostatné skupiny esperantistů na oslavách 1. a 9. máje.

Závazek kroužku na zvelebení a výstavbě obce /400 hodin/.

Akce k výročí J.A. Komenského - spolu s OMR.

Veřejné akce v rámci kampaně "Čs. esperantisté bojujícímu Vietnamu" /přednášky, výstavka/. Ke spolupráci byla získána většina místních organizací. Akce přinesla výrazný politický, morální a materiální výsledek /ten samotný činil 16 033 Kčs/.

To jsou jen některé prvky činnosti EK v Boru, který byl za svou činnost vyhodnocen při příležitosti svého tříletého trvání jako nejak- /dokončení na 9. str. /

S E M I N Á Ř ČES. Český esperantský svaz ve spolupráci s ministerstvem kultury ČSR uspořádá ve dnech 1.-3. prosince tr. seminář aktivistů českého esperantského hnutí.

Zvyšování odborné a politické úrovně funkcionářů je nejen v zájmu esperantského hnutí, ale také v zájmu celé naší společnosti. Ústřední orgány svazu usilují touto akcí o pozvednutí esperantského hnutí u nás na úroveň, jakou má v jiných socialistických zemích.

PŘIHLÁŠKU

na připojeném formuláři pošlete co nejdříve, žádáte-li nocleh, nejpozději do 15. října 1972, na adresu: Klub esperantistů v Praze, poštovní schránka 1069, Praha 1.

KONFERENČNÍ PŘÍSPĚVEK

ve výši 10.- Kčs zaplaťte poštovní poukázkou, kterou Vám pošleme po obdržení Vaší přihlášky. Příspěvek je určen k částečnému krytí režie.

STRAVOVÁNÍ

bude individuální.

zde odstříhnout

P ř i h l á š k a k oslavám 70 let Klubu esperantistů v Praze

Příjmení:..... Jméno:.....

Adresa:.....

Přihlašuji se k účasti na oslavách 70 let Klubu esperantistů v Praze / 24. - 26. XI. 1972 /.

Konferenční příspěvek poukazuji / poukáži ihned po obdržení poukázky /.

Datum:.....

.....
podpis

Nehodící se škrtněte!

P O Z V Á N K A

na oslavy

7 0 L E T

KLUBU ESPERANTISTŮ V PRAZE

ve dnech

24. - 26. listopadu 1972

1 9 0 2

1 9 7 2

Milí přátelé,

před sedmdesáti roky - 9. prosince 1902 - byl založen KLUB ESPERANTISTŮ V PRAZE jako první esperantský spolek v Čechách. Letošní významné výročí zasluhuje jistě pozornost nejen pražských, ale i mimopražských esperantistů. Připravili jsme proto k oslavě tohoto výročí hodnotný program a zveme Vás do Prahy. Věříme, že přijedete v hojném počtu a těšíme se na Vás. Abychom mohli včas zajistit ubytování a všechny služby, prosíme Vás, abyste nám svou účast oznámili připojenou přihláškou nejpozději do 15. října.

Přípravný výbor.

Pátek 24. listopadu:

19.30 Přátelské setkání.

Zájemcům o návštěvu Národního divadla nebo jiných pražských divadel opatříme vstupenky, pokud se včas přihlásí a poukáží zálohu. Přehled představení pošleme koncem měsíce října.

Sobota 25. listopadu:

KULTURNÍ DŮM G O N G , Praha - Vysočany,
Sokolovská 969

9.00 SLAVNOSTNÍ MATINÉ

Promluví předseda ČES J. Vítek a
program vyplní přední čeští umělci.

15.00 Divadelní představení.

20.00 Společenský večer s tancem.

Neděle 26. listopadu:

Prohlídka pamětihodností Prahy za vedení
odborného průvodce.

UBYTOVÁNÍ

opatříme těm účastníkům, kteří nemají možnost obstarati si nocleh sami. Je však nutné, aby poslali přihlášku do 15.října a poukázali zálohu 50.- Kčs. Název a adresu ubytovacího podniku sdělíme ihned po obdržení zálohy.

INFORMAČNÍ SLUŽBA

s prodejem esperantských publikací bude v pátek 24. XI. od 14.00 hod. v knihovně klubu, Týnská 3, Praha 1 / vedle Týnského chrámu na Staroměstském náměstí/ a v sobotu v kult. domě GONG ve Vysočanech od 8.00 hod.

O b j e d n á v á m :

1. Ubytování ze dne 24. na 25. XI. a z 25. na 26. XI. v hotelu A, B, C pro osob; souhlasím s cenou za ubytování maximálně Kčs za osobu a noc. Zálohu 50.- Kčs poukazuji / poukáži po zaslání poukázky /.
2. Vstupenku / ks vstupenek/ na divadelní představení pražských divadel 24. XI. a poukazuji zálohu 20.- Kčs za vstupenku.

Nehodící se škrtněte!

ANTAŬ 70 JAROJ FONDIĜIS ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

Ĝis la jaro 1902 ekzistis fakte nur unu fokuso de la E-movado en la ĉeĥaj landoj, nome la EK en Brno fondita en 1901. En Moravio aperadis ankaŭ la unua E-gazeto por ĉeĥoj, "Revuo Internacia" fare de Th. Ĉejka.

Kiel rememoras Eduard Kühnl, siatempe redaktoro de "Ĉasopis českých esperantistů", okaza vizito de la rusa esperantisto I.O.Seleznev en Praha, kiu serĉadis kelkajn samideanojn laŭ la Zamenhofo adresaro, kunvenigis la dissemitajn adeptojn en la bohemia ĉefurbo. La sopiro starigi ĉi tie la E-centron fariĝis de post tiam pli kaj pli forta, tiel ke, malgraŭ kelkaj malsukcesaj provoj vekti publikan atenton pere de la gazetaro, oni fine kunvokis, post la prepara kunsido en Konvikt, la fandan kunvenon de Esperantista Klubo en Praha. Ĝi okazis la 9an de decembro 1902 en la restoracio "U STAĴGRŮ" (hodiaŭ U Nováků en la Vodičkova strato) kun partopreno de 25 personoj, inter kiuj indas menciigi E.Weinfurter, la unuan prezidanton de EKP, la fratojn Ed. kaj Fr.Kühnl, St.Kamarýt kaj la ĉeĥan poeton S.K.Neumann.

Dum kelkaj jaroj trovigis la klubejo de EKP en la fama kafejo UNION. La unua publika E-kurso en Praha malfermiĝis fine de 1902 en la urba lernejo de St.Triumuo. Rolon de la kluba organo plenumis - ĝis la konstituigo de Bohema Unio Esperantista (1908) - la jam menciita Ĉasopis českých esperantistů.

La celo de EKP fiksita de la fondintoj estis: krom popularigo de Esperanto "vastigadi laŭjustan informadon pri la ĉeĥa nacio". Tuj komencpaŝe la klubo klopodis fidele servi al tiu ĉi devizo; atestas pri tio eldono de la Gvidlibro tra Praha (1908) premiita ĉe UK en Barcelono kaj alte aprezita de la londona urbestro Strong, plus eldono de politika libreto "Slovakoj kaj Magiaroj, 1908 ("pri la subpremataj fratoj"); partopreno de la klubo en la Jubilea ekspozicio aranĝita de Komerca kaj industria ĉambro samjare per siaj servoj al la esperantistoj kaj en la Sokolaj festoj (1907). La komitato de la bohema sekcio de la aŭstria ekspozicio en Londono atribuis al EKP honoran diplomon pro helpo farita ĉe propagandaj laboroj (1907). Ekstreme grava estas la fakto, ke EKP havis sian reprezentanton en la eksterlanda fako de la Ĉeĥa Nacia Konsilantaro (Česká národní rada) ekde 1907. - La klubo esence kontribuis al la sukceso de la I-a kongreso de la ĉeĥaj esperantistoj (1909).

Dume estiĝis en Praha kaj ĝia ĉirkaŭaĵo diversaj aliaj E-organizaĵoj kaj filioj de EKP precipe fakaj: Laborista Grupo Esperantista (1911), Studenta Rondeto Esperantista (1907), pli poste Unio de bohemaj studentoj (1909), la unua siaspeca societo en la mondo, fondita de K.Kuthan; Virina Klubo (1904), Akademia Klubo (1909) k.a. Kreiĝis krome institucio de la t.n. "konsuloj" (1906) kun la celo informi fremdlandanojn pri la ĉeĥa nacio.

Antaŭ la unua mondmilito la EKP nombris jam ĉirkaŭ 250 pagantajn membrojn, posedante ankaŭ sian propran bibliotekon kun pli ol 600 volumoj.

Post la naskiĝo de ĈAE (1920) la klubo disponigis al la nova organizaĵo tutŝtata siajn plej bonajn funkciulojn. Aparte ĝi meritiĝis en preparo de la XIIIa UK en Praha (1921), organizante tiam ankaŭ multajn E-kursojn. Okaze de sia 25a datreveno EKP aranĝis entute la plej ampleksan publikan ekspozicion priesperantan en Praha (1927).

La klubaj programoj tiutempe (post Union havis EKP sian sidejon en la kafejo Edison k.cet.) alportadis precipe kulturajn valorojn. Ili estis vizitataj ofte de publikaj reprezentantoj. Oni invitis i.a. la estonan esperantiston H.Seppik por fari E-kursojn, en la ĉefurbo haltis dum siaj prelegvojaĝoj K.Ajayi, M.Raden, J.Scherer. En 1931 elektiĝis kiel prezidento de EKP Jaroslav Šustr (funkciinta ĝis 1959) Eklaboris kune kun li en la kluba komitato F.Sviták kiel sekretario kaj A.Báročková kiel kasistino.

Aktivecon de la klubo paralizis la nazia okupacio. La laboro tamen daŭris plu, kvankam ne publike. En 1944, kvar jarojn post la malpermeso de EAĈSR, EKP estis aboliciita.

Post la liberigo de ĈSR EKP malfermis novajn E-kursojn kaj helpis rekomenci la E-elsendadon en la Ĉs.radio. En 1949-50 ĝi havis pli ol 500 pagantajn membrojn. Kiam ĉeĝis ekzisti EAĈSR (1952) ĝi fariĝis fakrondo de OB kaj denove memstarigis en 1968. Laŭ la nova statuto (1971) EKP estas loka grupo de ĈEA. Inter ĝiaj prezidantoj post 1959 estis i.a. J.Mařík, D-ro R.Horský kaj ark.J.Drlik.

O.Kníchal

Reprezentantoj de kvardek landoj en Portland

En ĉeesto de pli ol 900 kongresanoj el 40 landoj malfermis 30.7.1972 la 57-an UK de Esperanto en Portland, Usono, H.W.Holmes, honora prezidanto de UEA. La alta protektanto de la kongreso kaj la urbestro de Portland sendis salutleterojn, ses reprezentantoj de registaroj kaj naŭ delegitoj de neesperantistaj organizaĵoj salutis la kunvenon.

La festparoladon prezentis Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA. La ĉeftemoj de la 57-a estis "Monda turismo kaj lingva diverseco" kaj "La valoro de fremdlingva instruado en la lernejoj".

En sia parolado G.Becker alvokis al la pli kvalifikita prezentado de la internacilingva problemo en koncernaj medioj kaj al pli grandskala utiligo de ĉiuj eblecoj. "Tio povas iri", li diris, "kun daŭra organiza plifortigo de UEA, de la landaj asocioj, de la fakaj organizaĵoj, de la lokaj grupoj laŭ komuna baza laborplano, kiu adaptiĝu al la daŭre ŝanĝantaj kondiĉoj en ĉies lando kaj medio, por ke ni per komuna laboro helpata de la eksteraj kondiĉoj de ĉiam pli moderna mondo pliproksimiĝu al stadio, en kiu ĉiu homo povos komuniki siajn pensojn kaj sentojn al ĉiu alia homo ne nur ĉirkaŭ la Atlantiko aŭ ĉirkaŭ la Pacifiko, sed ĉie, eĉ dum renkontiĝoj sur la luno".

La kongreso proponis en sia rezolucio la ĝeneralan adopton de ununura lingvo por turismo.

El Ĉeĥoslovakio partoprenis la 57-an UK kiel turistoj membroj de ĈEA K.Piĉ kaj L.Fiala.

ESPERANTO POR SPORTULOJ

Sojle de la Olimpikoj en Munkeno aperis 22-paga konversacia broŝuro "Saluton amiko", (en 2000 ekz.) por sportuloj - en Esperanto, germana kaj angla. La aŭtoro estas R.L.Harry, aŭstralia ambasadoro en Bonn, eldonis ĝin L.Pickel kun la helpo de la Fonduso por Olimpiaj Ludoj. Simpatio pri la broŝuro montris i.a. la federacia kanceliestro W. Brandt. - A.Oberndorfer el Aŭstrio deĵoris kiel la unua esperantisto en "Olimpia Vilaĝo" por gazetaro, radio kaj televido.



Junulara kongreso en Toruń

Omage al la 500-a jubileo de la mondfama pola astronomo N.Kopernik - okazis en la pola universitata urbo Toruń la 28a kongreso de TEJO (16. - 21.7), kiam salutis ĝia honora protektanto, rektor de la universitato, prof.d-ro W.Lukaszewicz. Partoprenis 250 gejunuloj el 24 landoj.

Kiel sciigis FILO-PRESS inter la kongresaj aranĝoj estis la seminario pri eŭropa sekureco kaj kunlaboro. Oni decidis, ke TEJO kaj ĝiaj sekcioj partoprenu en la junulara konferenco pri sekureco en Helsinki (aŭg.1972). TEJO estos reprezentita ankau en la venontjara mondfestivalo junulara en Berlino.

En la ferma kunsido vicprezidanto de TEJO, d-ro H.Eichhorn el Berlino, konatigis opinion de la TEJO-komitato pri la rilatoj inter UEA kaj TEJO, nome, ke TEJO restu integra parto de UEA, neutrala laŭ partipolitika vidpunkto. Tamen tiu ĉi neutraleco ne baru la vojon al kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj. D-ro R.Cor-

Parolas M.Nájera el Meksikio

setti, Italio prezentis la novan estraron, kie esence restis la malnova. En la komitaton (parto b) eniris ankaŭ delegitino de JS ĈEA Jindra Ř e h á k o v á. La venontjara TEJO - kongreso estas okazonta en Sarajevo.

Hungara Kultur—Festivalo

okazinta en Budapeŝto de la 17a - 23a de julio allogis proksimume 450 geesperantistoj el tuta Eŭropo. Ĝia origina celo, konatigi al eksterlandaj partoprenantoj la historion, kulturon kaj vivon de la hungara popolo, miaopinie plene sukcesis. La zorgeme preparita programo prezentis valorajn erojn el la hungaraj literaturo, arto, muziko kaj folkloro; krome la organizantoj aranĝis tre interesajn ekskursojn en muzeojn, artgaleriojn, tra la urbo, surŝipe sur Danubo kaj en la hungaran pejzaĝon. Kiel ora fadeno ornamis la literaturan programon la nesuperebla tradukarto de K.Kalocsay, la nekronita reĝo de la E-poezio, kiu spite al sia aĝo, ĉiam modesta kaj freŝa, atente observis ĉiujn programerojn.

La multnombre vizitita kunveno de MEM atestis, ke la esperantistaro pli kaj pli konvinkigis, ke rilate al la milito oni ne povas resti neŭtrala. La MEM -kunvenon salutis inter aliaj ankaŭ la reprezentantino de la ĉeĥa MEM-sekcio M.Josková; ŝia referato pri Kampanjo por Vjetnamio de ĉs. esperantistoj elvokis varman aplaudon.

La E-movado en Hungario ĝuas favoron kaj konkretan subtenon de la registaro. Pruvis tion ankaŭ la ĉeesto kaj salutvortoj de la oficialaj registara, sindikata kaj magistrata reprezentantoj dum la inaŭgura kunveno. (Tom)

Bona ŝanco por la slovaka movado

"La penso pri la interfratiĝo de la tuta homaro kaj la vivo sen militoj estas daŭre aktualaj. Tial Slovaka Televido en Bratislava decidis elsendadi kurson de la internacia lingvo Esperanto", citas el la gazeto TELEVÍZIA "Esperantisto Slovaka".

La kurso komenciĝos jam la 3-an de oktobro en la kadro de la nacia sfero (dua programo). Ĝi konsistos el 18 lecionoj;

la klarigaj partoj estas solvitaj helpe de filmtruko, kio estas novaĵo en similaj programoj. Tion certe bonvenigos la spektantoj havantaj la t.n. vidkapablan memoron. Kaj tiuj - laŭ la lastatempaj esploroj - superas 90 elcentojn. En la scenetoj, kiuj estas parolataj Esperante, la auskultantoj vizitos interalie skikonkuron en Alta Tatra-Montaro, zoologian ĝardenon, ili faros ŝipekskurson sur Danubo.

"Esperantisto Slovaka" atentigas tiurilate, ke tiamaniere ĉiu slovaka esperantisto povas fariĝi kursgvidanto, kaj ĝi donas jenajn instrukciojn:

Ĉiu diskonigu en sia ĉirkaŭaĵo la fakton pri la televida kurso kaj ĝustatempe atentigu pri la dato de ties komenco. Necesas persvadi plurajn interesitojn, ke ili sekvu la kurson sub ies gvido. Ekzistu laŭeble pluraj kurs-grupoj, por kiuj oni aĉetu la kursan lernolibron. Post la kursfino oni klopodu anigi ĉiujn frekventintojn al la loka EK.

Ĉs.radio en Bratislava, Zochova 3 komencis elsendadi la 5-an de sept.kurson de Esperanto por progresintoj, kiu konsistas el 24 lecionoj. La tekstoj haveblaj ĉe Slovenská kniha, Nám.SNP 33, Bratislava.

PŘEDSEDNICTVO ČES O KOLPORTOVÁNÍ ZAHŘANIČNÍCH ČASOPISŮ

Po projednání došlých hlášení k výzvě v našem časopise (č.5/71) předs.ÚV ČES sděluje všem zainteresovaným členům svazu, že nemá námitek proti zprostředkování odběru následujících periodik jmenovanými zástupci (perantoj):

HEROLDO DE ESPERANTO (I.Železný, Praha) ESPERANTO GAZETO, SFRJ (J.V.Otta, Raškov, Šumperk), INTERNACIA FERVOJISTO, Norsko, (J.Pištor, Č.Třebová), OOMOTO, Jap.(J.Čichová-Hrdličková, Praha), INTERLIGILO, BLR (K.Racková, Plzeň), DIA REGNO, Hol.(dr.R.Horský, Praha), HOMO KAJ KOSMO, SFRJ(L.Křivánek, Písek); za předpokladu, že předplatné na tyto časopisy budou soustřeďovat výhradně na zvl. běžný účet u místní st.spořitelny a při disponování s těmito prostředky budou dodržovat předpisy platného čs.devizového zákona. Další zahr,esp.časopisy lze v ČSR kolportovat jen po předchozím souhlasu ČES. (sv)

Kim Lan

Hazarda

Edziĝo

(fragmento)



La sekvantan matenon la suno jam staris sur la ĉielo en la alto de bambustango, kiam Trang vekigis. Li sentis sin tute malpeze flirtanta, kvazaŭ li ĵus estis elirinta el songo, ankoraŭ dubante, ĉu li estas edzo.

Li etpaŝe iris en la korton kun ambaŭ manoj kunigitaj malantaŭ la dorso. La blindiga sunlumo de la somera mateno ekfrapis liajn ankoraŭ dormemajn okulojn. Li plurfoje palpebrumis kaj subite ekrimarkis, ke ĉirkaŭ li io estis ŝanĝita. La domo, la korto estis balaitaj, ĉio estis zorge ordigita. La ĉifone disiritaj vestaĵoj, ĵetitaj en iu angulo, sekigis nun sub la luno. Ambaŭ ĵaroj(1) ordinaraj tute sekaj ĉe la piedo de la gujavujo (2) estis ĝisrande akvoplenaj. La malpuraĵamaso, kuŝanta tuj apud la enirejo, estis forigita.

Lia maljuna patrino estis senherbiganta la aleon. Lia edzino ree balais la korton, audigante agrablan de la balailo sur la tero. La sceno estis banala kaj tute simpla, sed ĝi vekis en li profundan emocion.

Li estis ja fariĝinta familiestro. Li havos infanojn sub tiu tegmento, kiu ŝirmos lian idaron. Lia kaptis stranga feliĉo. Nur nun li trovis en si mem veran homon, kiu havis la devon zorgi pri la vivrimedoj de sia edzino kaj de siaj estontaj infanoj. Ĉe tiuj pensoj li kuris al la kortomezo dezirante fari ion por kontribui al tiu regeneriĝo de sia hejmo.

Ekvidinte lin sinjorino Tu mildvoĉe diris al sia bofilino :

-Nu, li estas vekiginta ! Iru do prepari la manĝon, infano mia, estas jam malfrue !

-Jes, panjo !

La virino tuj senbrue glitis en la kuirejon. "Si estas ŝanĝita!" - ekpensis Trang, ŝin konsiderante. Finita, tiu frivolulino, kiun li estis pli ol unufoje renkontinta en la provinca ĉefurbo ; hodiaŭ estis tute alie ; ŝi jam fariĝis virino modera kaj milda. Ĉu ŝia nova stato jam plirapidigis tiun metamorfozon ? La patrino de Trang ankaŭ radiis de feliĉo ; ŝia malsereza vizaĝo plivigliĝis dum ŝi fordonis sin al balaado kaj metis ordon en ĉiuj domanguloj. Ŝajnis, ke ĉiu trovis necesa pli bone ordarangi la domon, por ke la vivo fariĝu pli bona.

La manĝo estis kompatinde simpla. Meze de ŝirita ventolkorbo (3) troviĝis amaso da krude hakita trunko de bananujo, unu telereto da salo kaj unu eta marmito (4) da rizkaĉo, sed ĉiuj appetite mangis. La maljuna sinjorino Tu konigis al sia bofilino la hejmaferojn, la situacion de la familio. Ŝi rakontis nur gajaĵajn historiojn kaj parolis pri feliĉa estonteco.

-Trang - ŝi diris, - kiam vi havos monon, vi aĉetu paron da kokinoj. Proksime de la kuirejo estas loko por instali unu kokejon. Oni havos baldaŭ, post nelonge, tutan birdokorton...

Trang kontentigis per kapjesoj. Li konsentis pri ĉio. Neniam la atmosfero estis tiel intima, lia familio tiel harmonia ! Sed la konversacio subite interrompiĝis. Ĉiu estis preninta ĝuste du neplenaĵajn bovlojn (5) de tiu maldensa kaĉo kaj la marmito estis jam malplena.

La oldulino demetis sian bovlon kaj siajn manĝovergetojn (6), poste diris al siaj infanoj kun rideto :

- Atendu min ! Mi havas ion por vi !

Ŝi tremetante sin direktis al la kuirejo, poste anaspaŝe revenis brakumante unu marmiton, el kiu leviĝis densa vaporo. Metinte la fermoplaton apud la ventolkorbon ŝi agitis la enhavon per unu ĉerpilo.

- Jen dolĉaĵo anstataŭ deserto ! - ŝi anoncis premante unu bovlon. -Tre bongusta,

sciuj ! La bofilino prenis la bovlon el la manoj de sia bopatrino ; siaj okuloj subite malheliĝis, ekvidante pri kio temas. Si flegne enbuŝigis la "dolĉaĵon". Trang siavice prenis la duan bovlon, kiun plenigis la patrino, dirante kun invita rideto :

- Tio estas bransupo (7), filo mia. Tre palatoplaĉa. Vi nur provu ! Multaj familioj ne havas ĝin por manĝi !

Trang haste (8) enmetis en sian buŝon iom da tiu supo. Li grimacis ; la brano kun amara gusto restis algluita al lia gorgo. De tiam, dum la tuta manĝo neniu plu parolis. Ĉiuj proppenigis fingluti sian porcion kaj evitis rigardi unu la alian. Honto kaj indigno plenigis ilian koron.

Neatendite audigis urga rulado de tamburo en la komunuma domo. La korvoj, timigitaj, forlasis la altajn branĉojn de kapokujo (9) kaj faris cirklon super la bazaro.

La bofilino ĝemspiris kaj demandis :

- Kio okazas, panjo ?

- Rulado de tamburo por urĝigi la kolektadon de impostoj. Oni rabas ĉion kaj devigas nin kulturi kanabon (10). Kiel ni povos transvivi tiun malfacilegan epokon ? ...

La maljuna patrino urĝe turnas sian kapon, ne volante montri siajn larmojn al sia bofilino, kiu ŝajne tre miris kaj murmuris tra siaj dentoj :

- Kiel ! Oni pagas ankoraŭ impostojn ĉi tie ! ?

- Post momenta silento ŝi daŭrigis :

- En Thai Nguyen, en Baç Giang la loĝantoj rifuzis pagi impostojn. Ili eĉ perforte prenis la japanajn deponejojn kaj distribuis la rizon al la povraj (11) malsatuloj.

Trang profundigis en siaj meditoj. Lia granda vizaĝo kuntiriĝis zorgoplena. La plenbuŝo de amara brano ne volis descendi (12) en lia gorgo ... Li ekpensis pri ĉiuj, kiuj estis detruintaj la rizdeponejojn de la japanoj.

Tra sia gluto da brano li urĝe demandis :

- Ĉu ili estas membroj de Vjet Minh ?

- Jes ! Sed kiel vi tiam scias ?

Trang ne respondis. Li revidis en la memoro la amason da malsateguloj, kiuj defilis sur la digo Sop kun granda ruĝa standardo ĉekape.

Oni diras al li, ke ili estis membroj da Vjet Minh, kiuj iris preni la rizon. Ne tion kompreninte li ektimis kaj forkuris kun la rizo de la kompanio laŭ mallonga vojeto. Ha ! Se li sciis, ke oni distribuis la rizon al la malriĉuloj kaj malsateguloj ! Li subite eksentis bedaŭron.

En la komunuma domo la tamburo plu resonis, ĉiam urĝe. Lia patrino kaj lia edzino jam demetis siajn manĝilojn kaj ekstaris.

En la kapo de Trang ĉiam brilis la bildo de tiuj malsateguloj kun la ruĝa standardo, kiu flirtis en la vento.

(El la novelkolekto "La horlogisto de Djen Bjen Fu" , Hanojo 1971)

K l a r i g o j : /1/ ŝ a r o - granda terkruĉo por teni freŝa akvon aŭ vinon, /2/ gujavujo - arbo, kies pirformaj, ruĝverdaĵ beroj estas uzataj precipe por rumo, /3/ v e n t o l i - refreŝigi la aeron en fermita spaco, /4/ m a r m i t o - kuirvazo, en kiu oni faras buljonon, supon ks., /5/ b o v l o - larĝa duonsfera taso el argilo, fajenco aŭ ligno, /6/ m a n ĝ o v e r ĝ e t o - manĝilo uzata en iuj ekstremorientaj landoj, /7/ b r a n s u p o - supo kuirita el grenŝelo, /8/ h a s t i - rapidi, /9/ k a p o k u j o - ega falfolia arbo, /10/ k a n a b o - unujara herbo, /11/ p o v r a - kompatinda, /12/ d e s c e n d i - malsupreniri, masuprenflugi.

EBLECOJ KAJ REALECO DE LA INTERNACIA LINGVO

Inter la ĉeftemoj, kiujn pritraktis kadre de la 36-a bulgara E-kongreso en Smoljan (2.-4.7.) reprezentantoj de la E-asocioj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio, elstaris problemo de komunaj interlingvistikaj esploroj. Tiuj ĉi esploroj kompreneble neniel povas reduktiĝi je nura filologia rezonado, sed ili devas trakti IL ĉefe kiel gravan socian fenomenon, sekve ili devas rilati la tutan agad-sferon de Internacia Lingvo. Reliefigante en ĝeneralaj trajtoj la bezonon de sciencaj esploroj sur marksisma bazo, D.Blanke, red. de "Der Esperantist", venas al la konkludo, ke la fundamento estas tro mallarĝa kaj li pledas por plibonigo tiurilata. Sube ni resumas lian artikolon je tiu ĉi temo publikigitan en PACO, eldono de GDR, n-ro 4/72.

Niaopinie estus utile doni similan pritakson de IL-rola en diversaj fakaj kampoj, kie la manko de scienca sinteno aŭ kvalifiko - kiel ekzemple en literaturaj kreado kaj kritiko aŭ historio - estas multe sentebla.

Agnoskante la lingvon kiel socian fenomenon oni devas principe kontraŭstari la opiniojn, kiuj emas redukti ties rolon je nura lingvistika problemo aŭ hobia, eĉ sekteca movado. Aliflanke estus same malĝusta prediki opozicion kontraŭ la "tutmonde disvastigitaj" lingvoj kiel la angla, franca, germana kaj rusa kaj prezentadi Esperanton kiel "samrajtigilon" ekz. por la rusa kaj la angla. Necesas vidi, ke la pozicio de la angla estas rezulto - sendepende ĉu la lingvo estis akceptita sub premo aŭ ne - de la historia evoluo, same kiel la aktuala signifo de la rusa kiel lingvo de la unua socialisma ŝtato.

Efektiva baro de samrajta funkciado de la naĉiaj lingvoj sin kaŝas en la fakto, ke la militanta imperiismo ankoraŭ malebligas plenan realigon de la principoj de la paca kunekzistado progresigata dank' al la socialisma ŝtataro. Sed ĉu oni pro tio simple flankenlasu la problemon de IL kaj atendu, kion la evoluo alportos? Tio ja estus plena ignoro de la aktiva rolo de la homo en la socia evoluo, kiu per sia konscia reguliga agado efikigas la sociajn leĝojn. La nuntempa funkciado de IL havas jam hodiaŭ grandan signifon, eĉ se la politikaj kondiĉoj ne favoras dume ĝian ĝeneralan disvastigon.

La plej granda servo por la internacia lingvo estas kunkrei tiajn sociajn kondiĉojn, en kiuj la plena enkonduko kaj uzo de IL estus realigebla. Esperanto jam hodiaŭ donas sendube multajn pruvojn pri sia praktika utilo, kio plene motivigas ĝian pluan ekzistojon. Per sia ĉiuflanka aplikado Esperanto garantias sian propran evoluon kaj tio liveras argumenton pri ĝia utileco. El tio rezultas i.a., ke la 80-jaraj atingoj de IL postulas ĝisfundan pristudon por ke oni povu starigi la limojn kaj eblecojn de IL depende de la estontaj kondiĉoj.

Malĝusta pritaksado de la realaj eblecoj de IL en la nuntempa internacia situacio kondukis al la du ekstremoj: unue al pesimismo pro manko de oficialaj rekonoj, due al komplete supertaksado de IL por esti aplikota ekz. en la okcidenteŭropa merkato, en UNO ks. Tiu ĉi ambaŭflanka mispritakso videbligas ankaŭ certan saturigon aŭ eĉ stacion rilate disvastigon de IL en landoj kun relative forta movado.

Neniu ŝtato ja decidus adopton de IL por internaciaj rilatoj kun ĉiuj konsekvencoj, se ne estus tute certe:

a/ ke en aliaj landoj maturiĝis similaĵ decidoj, ebligontaj la realan internacian aplikon de IL;

b/ ke la ekzistanta, multflanka kaj ekzakta scienca materialo, la prognozoj kaj la internaciaj evolutendencoj nerefuteble pravas la

gustecon, avantaĝon, ja nepran neceson de tiu ĉi decido.

Kaj kion montras la realo? Mankas unue en premege grado seriozaj, sciencaj verkoj; doktoraj disertaĵoj pri IL - problemoj aŭ pli ampleksajn studojn oni povus dekfinde kalkuli, la revuoj kiel La monda lingvoproblemo, Esperantologio baraktas pro financaj malfacilaĵoj - aŭ aperas sporade. Institute estas prilaborataj la sciencaj aspektoj de IL, ekzemple en socialismaj landoj, nur en Sovetunio kaj Hungario.

Kiel progresigi la laboron sur tiu ĉi kampo? Ni menciuj nur la ĉefajn taskojn:

- a/ sistema kolektado, prilaboro kaj publikigo aŭ disponebla arkivigo de interlingvistika kaj esperantologia materialo;
- b/ ellaboro kaj daŭra fidinda kompletigo de la bibliografioj;
- c/ organizado, celkonforma aktivigado de la interlingvistoj kaj esperantologoj.

Speciale gravas, ke en naciaj fakrevuoj estu aperigataj seriozaj kontribuaĵoj pri interlingvistiko kaj esperantologio. Tamen multo alia estas krome fareda. Ĉar por parafrazi Zamenhof, ne sufiĉas nur montri planlingvon praktike taŭga, sed ankaŭ science klarigi, kial ĝi funkcias kaj en ŝanĝigantaj kondiĉoj funkcias. /k/

Recenzo

GEOLOGIO INTERNACIA - Kolekto de original - verkoj en Esperanto. Volumo 2, pĝ.144, 30,5x14,5 cm, eld.1972 Geindustria n.p. en Praha, respondeca gvidanto: RNDr. Jiří Šindelář CSc, ĉefa red. Josef K a v k a (Dr., CSc), teknika redakcio: Geologia Sekcio de ISAE. Eldonita okaze de la 24-a

sesio de la Internacia geologia kongreso en Montrealo 1972. (La 1-a volumo aperis okaze de la 23-a IGK en Praha, 1968). Ĉar la klopodoj, celantaj enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon de la geologoj ne povis esti plene disvolvita pro l' antaŭtempa finiĝo de la 23-a sesio, en Montrealo denove okazos seriozaj intervenoj plede por E.

Kion diru laiko pri tiu ĉi respektinda faka verko, ilustrita kaj plaĉe ekipita? Oni devas sincere admiri la laboron de tiuj, kiuj pretigis ĝin. Jen modelo de perfekta apliko de la Internacia lingvo sur kampo scienca. Traktatoj de aŭtoroj el Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, GDR, Brazilo, Kanado, Hungario kaj nacilingvaj resumoj (i. a. en portugala, hungara). Unu ekzemplo: "Demetiga medio de la paleo- ĝis mezozoikaj sedimentoj en la baseno Piauí-Maranhão" (Brazilo). - Aldonita estas latinlingva listo "Elementa grammatica linguae Esperanto" (Cailleux kaj Pumpr).

Ricevebla ĉe ĈEA po 24 Kčs plus afranko.

(jm)

ESPERANTISTÉ A NÁRODNÍ FRONTA /dokončení ze str.2/

tivnější složka v místě, a na zasedání výboru NF v červnu tr. za přítomnosti zástupců ONV, MěstNV, MěstV-KSČ, OMR odměněn obrazem města a čestným uznáním za záslužnou činnost. Při této příležitosti byl klubu udělen i diplom ÚV a mírové sekce ČES.

Ne všechny esperantské organizace mají stejné podmínky a možnosti jako třeba EK v Boru. Záleží však na iniciativě jejich výborů, na ochotě ke spolupráci s ostatními složkami v místě a zejména na vlastní účelně řízené činnosti, která při splnění těchto podmínek musí přinést užitek a dobré výsledky jak v rozvoji samotné esperantské myšlenky, tak i ve společném úsilí pro blaho našeho lidu, rozkvet naší socialistické republiky a pro mír ve světě. V tom je vlastně celý smysl naší práce, všeho našeho úsilí. /Ba/

Pli alta instru-nivelo en Lančov

La dua etapo de SET Lančov-1972 havis entute 120 anojn. Okazis du A-kursoj por infanaĵoj, tri A-kursoj normalaj, tri B-kursoj, du C- kaj unu D-kurso. Eksterlandanoj estis nur kvar el GDR.

La nivelo de la instruado estis esence levita sen ŝanĝo de la tendaraj reguloj, simple per pli rigora plenumado de ili. Nome la D-kurso estis dediĉita plejparte al praktika didaktiko, t.e. al provlecionoj en grupoj B kaj C, post kiuj sekvis ĝenerala pritakso de la ĝelernantoj kaj aparte detala pritakso en la propra D-rondo. La celo de tiu ĉi ŝanĝo estas samniveligi la SET-ekzamenojn kun la asociaj; nekomprenne al ĝi nedisigeble apartenas la samtempa nivellevado de ĉiuj ceteraj kursoj.

Nome la frekventinto de la C-kurso nepre devas jam regi la lingvon kaj skribi kaj buŝe, sen eraroj gramatikaj kaj difektoj en prononcado kaj lingvoritmo. Ĉar en la D-kurso li ne plu havos okazon nek tempon pliperfektigi sian lingvon. Praktike tio signifas, ke en D-kurson estos akceptata nur tiu, kiu sukcesos en C-kurso "eminente kun laŭdo" aŭ faros krom skriba hejma tasko apartan buŝan ekzamenon.

Ni gratulas al la gvidantoj de SET, ĉefe al ĝia instruisto K. Franc, pro tiu ĉi decido, ĉar SET farigis jam tre grava, ja eĉ decida ilo en tutŝtata skalo por "kreado" de novaj j u n a j esperantistoj.

Siajn impresojn el ĉijara SET en Lančov komunikis al ni la geedzoj Renate kaj Dieter B e r n d t el Berlino, kiuj skribis i.a. :

La ĉefaj esperantistoj povas esti feliĉaj kaj fieraj je tiu ĉi tendaro, kiu meritas ĉiaflankan subtenon. Dum 20 jaroj de sia ekzistado farigis SET vera Esperantujo kaj ĝi povas esti imitinda modelo por aliaj landoj. Bedaŭrinde, nur malmultaj eksterlandanoj partoprenas la tendaron. Ĉu eble pli granda propagando povus helpi forigi tiun ĉi mankon? Ĉu la socialismaj landoj ne povus fari iun interkonsenton?

Rondeta vivo

FRÝDEK MÍSTEK - 16paĝan prospekton (ĉeflingvan) pri tiu ĉi gemelurbo kun enmetita 4-paĝa esp. ekstrakto (fare de s. Bartovská) kun fotoj de J. Solnický eldonis MNV Frýdek Místek.

BRNO - Tricent grandaj okulfrapaj afiŝoj atentigas la publikon pri novaj kursoj de E-o. - Jam preskaŭ tri jarojn 9 redakcioj en Brno ricevas informojn pri IL kaj la movado. Certagrade estas sentebla la bonfara efiko de la konstanta informado. Prizorgas J. Vondroušek.

MĚLNÍK - En la urbo de vino estas okazonta jam la 6-a renkontiĝo esperantista. Notu en vian kalendaron : 22.10.1972 !

OSTRAVA - E-kurson en VŽKG finis per ekzameno 19 partoprenantoj. El ili tri ĉe estis la internacian labor-tendaron en Karlovo, Bulgario (14.8.-9.9.). E-o estis tie unusola interkomprenilo por 80 naci-anoj el Sovetio, Pollando, Hungario, Bulgario, Francio kaj ĈSSR.

PRAHA - Por soleni la 70an jubileon de EKP la esperantistoj de nia ĉefurbo kunvenos la 25an de nov. en la kultura centro "Gong", Praha-Vysočany, kie estos pre-

parita tuttaga kultura programo. La estraro de ĈEA decidis 29.7., ke la Asocio akceptas la rolon de protektanto kaj kunarĝanto.

EKP poŝtadas 3 kursojn E-a, pro začátečníky, pokročilé a konverzační kurs. Zahájení je 3.10. v ZK Strojexport, Praha 1, Václ.nám.56. Přihlášky přijímá A. Bárochová, Praha 2, Sokolská 17, tel. 22 98 297.


ZNOJMO - Ĉe la kleriga societo restarigis EK, kiu jam estas aranĝanta E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj, krome ekspozicion de bildkartoj.

Samideana kroniko

Forpasis 11.8. Alfréd Š e b e l a el Nový Jičín en la aĝo 64 jaroj.

Oran geedziĝon festis 25.9.72 Jan Mikš Ch a n o v s k ý, literaturisto kaj lia edzino, vivantaj en Praha.

Niajn gratulojn !



SIGNALILO

FERVOJISTA
SEKCIO
DE ČEA

JARKUNVENO DE FERVOJISTA SEKCIO DE ČEA okazos la 18-an kaj 19-an de novembro en Česká Třebová, Uzina Klubo de ČSD.

Programo:

sabate antaŭtagmeze: alveno de la partoprenantoj; posttagmeze: vizito al Lito-myšl, la naskiĝurbo de la famekonata komponisto B.Smetana; vespere: kunsidoj de

komisionoj /18,00/ kaj amuza vespero /20,00/. Dimanĉe: jarkunveno /9,00/.

Bv. aliĝi ĝis la 1-a de nov.ĉe: Jiří Pištora, Nám.míru 1746, Česká Třebová. En via aliĝilo ne forgesu mendi ankaŭ la tranokton !!!

RENKONTIĜO KUN GEKOLEGOJ EN POLLANDO. Por plifirmigi amikajn rilatojn inter la esp.fervojistoj en Č.Třebová kaj tiuj de Klodzko, oni realigis peraŭtobusan ekskurson. La polaj amikoj atendis la ĉeĥan karavanon ĉe landlimo kaj preparis por la gastoj varman kaj amikan akcepton.

La renkontiĝo komenciĝis per trarigardo de vidindaĵoj de la regiono Klodzko. Poste oni preparolis spertojn kaj problemojn de ambaŭ E-rondetoj; ne mankis eĉ amuza vespero ĉe tendarfajro. Surprizo de la vespero estis alveno de junaj polaj esperantistoj, kiuj pliriĉigis la programon per kantoj. Dimanĉe antaŭ la forveturo de la vizitintoj denove ĉiuj kunvenis al la amika kunesto. Adiaŭante oni promesis: "Ĝis la revido en Česká Třebová!"


ĈIUJ GEINTERESITOJ PRI LERNADO DE ESPERANTO el Praha kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ĉu komencantoj aŭ progresintoj, aliĝu al la kursoj dum vintra periodo, petante informojn per telefono ĉe "Ústav podnikové výchovy", n-ro 900 / 5561.

MALLONGE PRI LA 24-a KONGRESO DE I F E F EN LUGANO, Svisio/6.-12.5/

- venis entute 660 personoj, inter ili troviĝis 550 fervojistoj
- cent grandaj afiŝoj invitis publikon por partopreni la kongreson
- dum la malferma kunsido la salutantoj uzis nur Esperanton
- kunsidon de la junulara sekcio ĉeestis 23 personoj el 8 landoj
- la kongresanoj vizitis la plej imponan lokon de la regiono: Monte Generoso
- oni vizitis la var-stacion en Chiaso, kien alvenas potage proksimume 2400 vagonoj; ili devas esti ĉi tie rearanĝitaj en la novajn trajnogarniturojn antaŭ ol traveturi la Gothardan pasejon
- la dua ekskurso al la ĉefriparejo de fervojveturiloj interesis ne nur la kongresanojn, sed ankaŭ televidon. La riparejo okupas 651 dungitojn, dumjare ĝi prizorgas 270 lokomotivojn, 10 600 var-vagonojn kaj 850 person-vagonojn.
- faka prelego kun la filmoj priskribis la Gothardan fervojon, alportante geologiajn, etnajn kaj klimatajn informojn same ki-el teknikajn detalojn
- pri la lukto kontraŭ la lavangoj raportis la alia filmo: "Sekureco ĉe la fervojoj"
- kongresloko por 1973 estis elektita Aarhus, kongreslando por 1974 provizore iĝis Hispanio.

V minulém měsíci byla vy-
stavena členská legitimace s
číslem 3 000. Jejím majite-
lem se stal student Jaromír
Hinčica z Ostravy a získal
tím knižní dar a bezplatné
členství ve svazu na dalších
pět let. Místní skupina při
VŽKG Ostrava obdržela rovněž
knižní dar a po dobu tří let

Penka
do sekretariátu



bude dostávat zdarma 3 výtisky svazové-
ho časopisu Starto. o K 31. 8. 1972 bylo vydáno celkem 3 038 člen-
ských legitimací. Platících členů svazu je ke stejnému datu 2 186.

PŘEHLED MS /EK/ PODLE POČTU PLATÍCÍCH ČLENŮ /k 31. srpnu 1972/:

Praha - 283, Mělník - 103, Brno PKO - 102, Paskov - 121, Třebíč -
99, Kopřivnice - 81, VŽKG Ostrava - 71, Vsetín - 63, Č. Budějovice -
46, Třinec - 42, Šumperk - 40, Č. Třebová a Plzeň - 39, Jablonec n.N.
- 37, Liberec a Pardubice - 35, Tábor - 32, Opava a Poděbrady - 30,
Stonava - 30, Žďár n.S. - 29, Hradec Králové a Ústí n.L. - 28, Kolín
a Příbram - 26, Mor. Budějovice a Písek - 25, Polička a Poruba - 24,
Bor u Tachova, Hranice a Roudnice n/L. - 21, Prostějov - 20, Bučovi-
ce - 19, Svitavy - 18, Znojmo SZTŠ - 18, Havl. Brod - 16, Olomouc -
Příbor a Trutnov - 15, Hořice v P., K. Vary, Kyjov, Miletín a Vyškov
- 14, Brno l.B. a Havířov - 13, Jihlava ZK, Lanškroun, Přerov - 12,
Gottwaldov - 11, Český Dub, Most, Náchod, Nový Jičín a Ostrava ČSD -
10, Boskovice, Č. Lípa, Frýdlant n.C. - 9, H. Počápy, Městec Králo-
vé a Znojmo OB - 8, Cheb, Jaroměř, Frýdek Místek a Semily - 7, Hod-
onín, Jihlava DK, Kladno, Litomyšl, Ostrov n.O. a Žamberk - 6, Lich-
nov a Turnov - 5.

DARY NA EDIČNÍ FOND :

Ant. Quadrát - 20, Lad. Kozel - 10, Jiří Beneš - 10, Marie Michál-
ková - 6. Všem dárcům děkujeme!

Akce slosovatelných knižních poukázek /SKP/

bude uspořádána i v letošním roce. Cena poukázky je 10.- Kčs a po
slosování bude vyměněna, bez ohledu na to zda vyhrála, v plné hodno-
tě 10.- Kčs za publikace, odznaky a jiné materiály dle nabídky svazu.
Slosování bude provedeno dne 22. listopadu v Praze. Podrobnější in-
formace jsme již rozeslali všem MS a EK a dalším zájemcům je pošleme
na vyžádání. Věříme, že této výhodné možnosti využijí všichni členo-
vé a příznivci svazu.

Ĉeĥoslovaka n-ro de "OTAVAINEN",
aperinta en 1925, serĉata en 1-2
ekz. Sendu al Ota G i n z, Reĥov
Golomb 5, 29000 KIRJAT JAM, Isra-
elo, kiu rekompencas - ĝis 2 ekz. -
per Ĉeĥoslovaka numero de "Lite-
ratura Gazeto, Budapest" aperin-
ta en 1932.

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Espe-
ranto-Asocio, p.kesto 8, Praha 2.
Aperas okfoje jare. Respondeca
redaktoro O.Knichel. Redakta ko-
mitato: ing. E. Felix, J. Mařík,
ing. F. Sviták. Abonebla sole por
la membroj de ĈEA. Transdonita al
presejo 8. 9. 72.

Dohlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen ŘP Praha
j. zn. P/1 - 2283/1971, dne 6! 5. 1971.